



Mar  
30

## **Forpasis Vera Lucia Gonçalves Araújo** **(1941-2021)**



Vera Lucia Gonçalves Araújo (1941-2021). (Foto: persona fotaro/Facebook)



## **KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ – KKE**

### **Cooperativa Cultural dos Esperantistas**

– SEDE PRÓPRIA –

---

Je la 28-a de marto forpasis en Rio-de-Ĵanejro la instruistino Vera Lucia Gonçalves Araújo, 79-jara. La antaŭan tagon ŝi trapasis ĥirurgion por trakti vundon en la stomako, kaŭzita de ulcero, kiu okazigis elfluon de stomaka suko kaj aero en la abdomenan kavon. Post la fino de tiu operacio, ŝia sanstato ege malboniĝis kaj ŝi estis kondukita en la intenskuracejon, kie ŝi ne plu sukcesis rezisti.

Vera Lucia Gonçalves Araújo naskiĝis je la 19-a de junio 1941. Ŝi estis membro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE). En tiu institucio ŝi kunlaboris laŭlonge de la jardekoj. Ŝi partoprenis plurajn Esperantajn eventojn enlande kaj eksterlande.

Vera Araújo intense agis en la spiritisma medio. Ŝi kunlaboris en la spiritismaj-esperantistaj iniciatoj estigitaj de la Spiritisma Konsilio de Ŝtato Rio-de-Ĵanejro (CEERJ). Ŝi frekventis kunsidojn en la Spiritisma Centro João Batista (Johano la baptisto), troviĝanta en la kvartalo Méier, en la norda regiono de Rio. Tie ekzistas Esperanto-grupo, en kiu Vera Araújo instruadis la lingvon al infanoj, junuloj kaj maljunuloj.

Krome ŝi laboris kiel mediumo. Ĉi-rilate ŝi ofte ricevis mesaĝojn de spiritoj, kiuj vivis en diversaj landoj kaj ligiĝis al la idealoj de Esperanto. La radio-parolisto Givanildo Costa, kun kiu Vera Araújo kunagis dum pluraj jaroj en KKE kaj CEERJ, reliefigis la personajn trajtojn de la ĵus forpasinta amikino:

– Dum sia vivo ŝi diskonigis kaj spertis spiritismon tiamaniere, ke ŝiaj agoj respegulis la evangeliajn instruojn de Jesuo kaj de la spiritisma doktrino, kiujn ŝi atestis pere de mediumaj rilatoj kun spiritaĵoj el pluraj landoj, pere de Esperanto. Ŝi ĉiam agis surbaze de la de ŝi amata triobla idealo Evangelio-Spiritismo-Esperanto.

La funebra ceremonio havis lokon en la komenco de la posttagmezo de la 29-a de marto, en la Kremaciejo Penitência, kiu troviĝas en la Tombejo Caju, situanta en la havena regiono de Rio. Tiu solenaĵo estis limigita al familianoj kaj proksimaj amikoj, pro la prevento-reguloj kontraŭ KOVIM-19.



**KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ – KKE**  
**Cooperativa Cultural dos Esperantistas**  
– SEDE PRÓPRIA –



Vera Araújo (centre) dum kulturkunsido en KKE. (Foto: Tania Paixão)



Vera Araújo (centre) inter samideanoj, dum ekskurso organizita de KKE. (Foto: Desiderio Pires Silveira)

<https://esperantoilustrita.blogspot.com/2021/03/forpasis-vera-lucia-goncalves-araujo.html>.



**KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ – KKE**  
**Cooperativa Cultural dos Esperantistas**  
– SEDE PRÓPRIA –

---

**Rio de Janeiro, en la 12-a de Majo, 2021.**

Antaŭ ĉirkaŭ 8 jaroj mi renkontis esperantistinon Vera Lúcia Gonçalves Araújo ĉe la Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE) dum unu el la kulturaj eventoj de la Kooperativo kaj baldaŭ ni amikiĝis. Tiam ni partoprenis multajn aliajn KKE-kulturajn renkontiĝojn kiel "TEO JE LA KVINA", "FENESTRO POR LA MONDO", "MONATA NASKIĜTAGA FESTO" kaj "KONU LA URBON RIO-DE-JANEIRO PIEDMARŜE, PAROLANTE LA ESPERANTAN KAJ LA PORTUGALAN LINGVOJN". Pro la ĉesigo de la agadoj de la Kooperativo dum la jaro 2020 kaj la komenco de 2021, pro la Pandemia KOVIM-19, pasis pli ol unu jaro de kiam mi parolis kun Vera persone, sed preskaŭ ĉiutage ni interŝanĝis mesaĝojn per Vatsapo aŭ babilis telefone kiam la afero estis pli urĝa. Do, kun granda bedaŭro mi ricevis la novaĵon pri lia morto! Tamen, ĉar ni scias, ke nia spirito postvivas la morton, ni kredas, ke ni renkontos denove en la estonteco kaj daŭrigos nian evoluan vojaĝon. **Desiderio Pires Silveira.**

Estas Spirito, kiu multe stimulas nin IRI ANTAŬEN pro siaj faraĵoj celante la BONON, tiu estas la kazo de nia AMATA AMIKINO KAJ FRATINO ĈE JESUO, VERA LÚCIA ARAUJO GONÇALVES. Spiritistino, kiu ĉiame disvastigis kaj vivigis SPIRITISMO-n ene de si, tiamaniere ke siaj vivfarintaĵoj respegulis agojn de virino surbaze de la EVANGELIAJ INSTRUOJ DE JESUO KAJ DE SPIRITISMO, krome pravigi pere de si mem, interilatiĝojn kun FRATAJ GEAMIKOJ DE KELKAJ LANDOJ PERE DE ESPERANTO. VERA, kiu multe apogis la Esperantistan Movadon kaj E-Insituciojn kiel ekzemple "KKE- Kulturen Kooperativon de Esperantistoj" kunordigis kun ni la Spiritismajn-Esperantajn Aktivecojn de nia urbo kaj Ŝtato Rio de Janeiro ĉe "CEERJ". Ŝi partoprenis en Esperantaj Kongresoj ekstere kaj ene de Brazilo kaj en Spiritismaj-Esperantaj Eventoj variaj. Ankaŭ VERA LÚCIA, agadis ĉe " Centro Espírita João Batista", dum multaj jaroj diversfunkcie, el ili instruante Esperanton al geinfanoj, gejunuloj, gemaljunuloj tie, kie estas Esperanta Grupo. Por fini, ŝi ĉiam agadis surbaze de siaj tri amataj Idealoj, kiuj estas EVANGELIO, SPIRITISMO KAJ ESPERANTO. Frate, **Givanildo Ramos Costa.**